


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2008



Aŭtunaj Tagoj en Heinola, p. 14

Dana E-asocio 100-jariĝis, p. 8 ♦ IJF-matkatunnelmia, s. 9
Aktuale pri Balta Maro kaj Sudafriko, p. 4-7

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 050 365 0037 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 20 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Teuvo Alavillamo, Leväsjoentie 535 C, 29810 Siikainen. ☎ 040 536 9728 ✉ fantomo@jippii.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Nia nacio

Reĝlando Svedio perdis, bonŝance al si, siaj najbaroj kaj sekve ankaŭ al sia orienta parto definitive ”grandpotencan” pozicion antaŭ ducent jaroj. Pri tio vidu nian antaŭan numeron. Sekvis periodo de 110 jaroj, kiu por ni finnoj signifis – plejparte – evoluon, stabilon, kreskon, solidiĝon. La cara imperio faris siajn eksterajn militagojn, sed tiuj ne multe influis ĝian nordokcidentan angulon.

La jarcento estis progresata, sed ni ne forgesu la kondiĉojn de la epoko. Norda naturo estis idilio nur laŭ por kamparanoj malproksima vidpunkto de la supraklasa estetiko; homoj kiuj tiris el tiu naturo vivtenon sian kaj ankaŭ tiun de la supra klaso, sentis la severon de la naturo. Klimataj perturboj kaj sekvinta perdo de rikolto en la 1860-aj signifis katastrofon: Malsato kaj malsano duobligis mortadon dum jaroj.

Tamen la loĝantaro dum la 110 jaroj pli ol triobliĝis al tri milionoj. Progresanta agrikulturo kaj disvolviĝanta industrio povis vivteni pli grandan popolon. Tiaj plimultiĝo kaj progreso kaj postulataj de tiuj kono, klero, civilizo, igis progresemajn intelektulojn kaj administrantojn gvidi kaj evoluigi la socion popollingve. Tiu evoluo kunkudris la gentojn en la grandduklando kaj ekestis finna nacio. Unueco nacia unuflanke, dismembriĝo socia aliflanke: Supraj klasoj ja certe volis la plejbonon de laborantaj amasoj, sed ankaŭ ne volis cedi siajn privilegiojn.

Kiam la nacio en 1917 post falo de la caro

uzis la ŝancon preni ŝtatan sendependecon, aperis la demando, kia Finnlando fariĝu. Komence de 1918 socialistoj fondis registaron, ”popolan delegitaron” en Helsinko, kaj la eksgrandduklanda senato fuĝis al Vaasa en Ostrobotnio. La sendependecon de Finnlando komencis civila milito, kiun finis la venko de la senata ”blanka” armeo kun helpo de germana Balta Divizio, kiu konkeris Helsinko en marto sub generalo Rüdiger von der Goltz. Miloj da finnoj perdis la vivon en bataloj dum la kvar militaj monatoj, kaj multoblo da ”ruĝaj” malvenkintoj ekzekutitaj kaj mortintaj en koncentrejoj en postmilitaj monatoj; entute pereis preskaŭ 40000 homoj.


La alianco de la senato kun Germanio rezultigis ankaŭ, ke Finnlando ekhavis reĝon: La parlamento – duona, ĉar la socialistoj krom unu estis mortigitaj, arestitaj aŭ fuĝintaj – aprobis monarĥion kaj elektis germanan princon kiel reĝon. Fino de la mondmilito nuligis tion, kaj ankaŭ la liberala opozicio. Interalie juna studentino Irja Klemola – duonjarcenton poste prezidanto de EAF – spitis aŭtoritatojn kaj forte pledis por respublika konstitucio.

Pasintaj naŭdek jaroj estis progreso kaj problemoj. La nacio nun, kelkajn generaciojn poste, estas malsama, sed simila; estas egal-eco, sed kiuj havas pli da egaleco, ne emas sian superfluan cedi. Ke nacio estu komuna, ne sufiĉas nomi ĝin tia.

Nacio estas unu faceto de socia organiziĝo. Nacionalismo estas miskompreni tion.

Tuomo Grundström

Perspektivoj trans la Balta maro



Ni finnoj multe rigardas eksterlandojn el perspektivo trans la Balta maro. Jam en la foraj prajtempoj de historio ni ricevis la kontaktojn kun okcidenta kulturo trans la maro, kiam svedoj venis kaj konkeris nian landon. Dum jarcentoj la kontaktoj de finnoj kun alilandanoj okazis plejparte per ŝiptrafiko trans la Balta maro. Ŝipoj ja estis la plej efika veturilo por transporti signifajn kvantojn da varoj, kaj alian marbordon ol al la Balta maro Finnlando ne havis krom dum la du jardekoj ekde 1920, kiam al Finnlando apartenis peceto da la bordo de la Arkta maro.

Iom la trafika sistemo diversiĝis pro trajnoj, aŭtoj kaj aviadiloj, sed la frida milito de la 20a jarcento denove problemigis la orientan direkton kaj emfazis la baltmaran direkton de la eksterlandaj kontaktoj de la finnoj. Nun post la frida milito forte multiĝis la trafiko ĉe la orienta limo – eĉ tiom, ke la vicoj da kamionoj ĉe la landlimaj transirpunktoj iĝis daŭra fenomeno kaj granda problemo en la sudorienta Finnlando. Tamen, kiam finno veturas eksterlanden, la veturo tre ofte okazas ŝipe trans la Balta maro.

La marbordoj estas ankaŭ gravaj por pasigi feriojn. Multaj finnoj havas somerdometon ĉe la maro, kaj konatiĝon kun la eksterordinara insularo ni rekomendas ankaŭ por eksterlandanoj vizitantaj Finnlandon. Sed la Balta maro ne fartas bone. En la plej lastaj jardekoj konatiĝis fenomeno de amasiĝo de cianobakterioj en la akvo. La venenaj bakterioj faras la akvon danĝera por naĝado kaj alia uzo. Vintre ili ne povas kreski, sed ĉiun someron la sunlumo kaj varmo akcelas la kreskon de la cianobakterioj. Kiam la bakteriaj amasoj estas en pinto, oni ne povas eĉ preni la akvon por uzi ĝin por lavi sin en saŭno. Kvankam ni loĝas en akvoplana lando, kie malpuriĝo de la maro kaj lagoj ne tuj estas

probleme, tamen estas problemo por iuj, kiuj kutimis preni akvon al saŭno rekte el la maro aŭ

lago, kaj ne plu ĉiam povas – precize en mezo de la somero, kiam oni volus fari tion.

La amasiĝo de la cianobakterioj ne estas nova fenomeno en la Balta maro – oni scias ĝin jam almenaŭ el la 19a jarcento, kaj verŝajne ĝi ekzistis preskaŭ tiom longe, kiom la Balta maro ekzistis. Ĝiaj naturaj kaŭzoj estas la geologiaj trajtoj de la maro – malprofundeco, limigita ŝanĝo de akvo kun la oceano kaj ioma sed ne granda enhavo de salo. La fenomenon tamen akriĝis la agoj de moderna homaro, la ellaso de malpuraj akvoj, kies substancoj, precipe fosforo, nutras la bakteriojn.

La bazon por kuracado de la Balta maro oni bone scias. Oni devas limigi uzon de fortaj sterkaĵoj en terkultivado kaj pli bone purigi la rubakvojn ellasatajn el domoj kaj fabrikoj. Sed unu obstaklo antaŭ la realigo estas internacieco. Diversaj socioj apud la maro havas diversajn nivelojn de ekonomio, teknologio kaj edukado, kaj ankaŭ diversajn motivojn por siaj agoj. Se unu aganto polucias kaj alia suferas pro la sekvoj, povas esti malfacile ordigi la ĝustigon, des pli, se la agantoj situas en aliaj landoj.

Etna kaj lingva diverseco ĉe la Balta maro estas granda. Estas naŭ ŝtatoj kun propra nacia lingvo por ĉiu, kaj krome kelkaj etaj minoritataj lingvoj. Plie oni devas ankaŭ konsideri kelkajn landojn, kiuj ne havas marbordon ĉe la Balta maro, sed el kiuj fluas riveroj al ĝi. En la lingvoj estas anoj el kvar lingvogrupoj – germana, slava, balta kaj finno-ugra – pli ol unu lingvo el ĉiu grupo. Tia lingva bunteco ĉe unu ne granda

maro estas relative multe, almenaŭ en Eŭropo, kiun ĝenerale tamen dominas grandaj lingvo-regionoj.

Limoj de la kulturaj sferoj ankaŭ dividas la regionon. La limo de orienta kaj okcidenta Eŭropo trafas la Baltan maron – rekte en la mezo, se oni kalkulas en orientan Eŭropon laŭ la plej vasta kriterio ĉiujn eksajn socialismajn landojn, sed ankaŭ, se oni pli malvaste konsideras orientajn nur landojn de ortodoksa religio kaj cirila skrib-sistemo. Kaj ankaŭ la limo de norda kaj meza Eŭropo dividas la Baltan maron. La situacion apenaŭ helpas tio, ke parto el la landoj estas inter la plej grandaj kaj fortaj en Eŭropo, aliaj inter la plej malgrandaj.

Ofte estas facile akuzi, ke la najbaro polucias pli multe – kaj mem polucii plu. Multaj en Finnlando argumentas, ke estas preskaŭ egale, kiom la finnoj purigas siajn proprajn akvojn, ĉar la grandaj urboj en Rusio, precipe St. Peterburg, tamen polucias multoble pli. Tamen ankaŭ en St. Peterburg estas purigejoj de rubakvoj kaj ankaŭ Rusio membras en HELCOM, la komisiono por protektado de la Balta maro. Tiun internacian kunagadon oni komencis jam en la 70-aj jaroj, pli konkrete en marto 1974, kiam la ĉebordaj ŝtatoj subskribis traktaton por protekti la maron kontraŭ ĉiuj eventualaj polucioj. En la 80-aj jaroj oni evoluigis la sistemon per fondi daŭran komision.

La komisiono daŭre plu laboras por la protektado, kio faciliĝis pro fino de la frida milito kaj naskiĝo de malpli drasta politika divideco. Pli ĝin helpas tio, ke preskaŭ ĉiuj landoj ĉe la maro nun membras en la Eŭropa Unio, do ekzistas funkcia leĝfara sistemo por regni la maron, se nur kunlaboro inter EU kaj Rusio ankaŭ funkcias.

Dum lastaj jaroj la klimatsanĝiĝo akiris famon kaj estas celo de internacia agado. Samtempe

ni devas tamen ankaŭ memori, ke ĝi ne estas la sola ekologia problemo, kiu bezonas internacian traktadon. Certe estas, ke ankaŭ dum la komenca somero la Balta maro verdas pro amasoj de cianobakterioj. Kiam ilia kvanto turniĝos al malkreska tendenco, esence dependas de internacia kunlaboro.

La nutrozaj akvoj, kiuj amasigas cianobakteriojn, ne estas la sola problemo, kiu minacas speciale la Baltan maron. Alia estas transportado de oleo kaj naturgaso el Rusio al Mez-Eŭropo. Transporti oleon en maro, kiun vintre kovras glacio kaj kiu pro sia malprofundeco estas vundebila, estas risko. Intertempe rompiĝas ŝipoj kaj disfloras oleo sur la maro, kaj la transporto ŝajnas ankoraŭ kreski.

Tamen la olea problemo estas principe facile solvebla: simple faru bonajn ŝipojn kaj uzu ilin garde, ne lasu oleon en la akvon – kaj ne estas problemo. Ankaŭ por la produktantoj kaj uzantoj de la oleo estas ekonomie avantaĝo ne lasi oleon en akvon, la akcidentoj ja estas nur mona perdo. Pli komplika afero estas, ke por multaj agantoj estas ekonomie la plej avantaĝa maniero agi tiel, ke oni ne purigas rubakvojn tiel, kiel la stato de la maro postulus.

Ofta fenomeno por la homo estas akuzi aliajn pro siaj problemoj. En tiu ĉi gazeto skribas Eli-see Byelongo el Sud-Afriko pri tieaj lastatempaj okazaĵoj. La akuzoj, kiujn iuj tie esprimas kontraŭ enmigrintoj, sonas tre similaj kun tiuj, kiuj aŭdeblas ankaŭ en Eŭropo: ili forprenas la laborojn, posedaĵojn kaj virinojn. Ne multa diferenco, ĉu la lando estas riĉa, malgranda kaj etne-lingve unueca, kiel Finnlando, aŭ malriĉa, granda kaj etne-lingve bunta, kiel Sud-Afriko, la samaj akuzoj taŭgas, se oni volas lasi siajn frustracojn flami kontraŭ fremduloj.

Mikko Mäkitalo

Ĉielarko-nacio tutruĝa pro sango

Kvankam la tuta mondo kondamnas la mortigojn far nigrulaj sudafrikanoj kontraŭ samhaŭtaj eksterlandanoj, ĉiuj ankoraŭ sindemandas, kio estus la gvidmotivo de tiaj malhomaj agoj kontraŭ senkulpaj rifuĝintoj kaj profesio-serĉintoj aŭ nur alilandanoj vivantaj en Sud-Afriko.

Pliaj demandoj estas, kial kaj kiu estus malantaŭ tia maldia mortigado de infanoj, virinoj, olduloj kaj senlaboruloj samkiel laborantoj el landoj ĉu najbaraj ĉu el foraj regionoj de Afriko.

Kvankam tiu ĉi artikolo ne respondos al ĉiuj demandoj ĝisfunde, certas, ke kelkaj klarigoj estos elĉerpitaj.

Ni agnosku, ke enmigris centoj da miloj kaj kelkkaze milionoj en Sud-Afrikon el aliaj landoj dum kaj post la apartismo; ĉirkaŭ 3 milionoj da Zimbabvanoj vivas en tiu ĉi lando. Pli da Svaslandanoj loĝas en la teritorio de Sud-Afriko ol restis en reĝlando Svaslando. Bosvanoj, Mozambikanoj kaj rifuĝintoj el DR Kongo, Burundio kaj Ruando, samkiel aliaj el foraj regionoj de Afriko – Somalio, Sudano ktp., kiuj fuĝis genocidon el siaj respektivaj landoj kaj aliaj kiuj enmigris pro ekonomia kialo nun vivantaj, laborantaj aŭ nur ankoraŭ serĉantaj laborojn dum kelkaj iniciis ion por vivtenigi sin.

Terure estas, ke tiuj ĉi homoj estis atakitaj unue en Johanesburgo kaj poste en aliaj provincoj kun la timo ke la atakoj povas atingi la tutan landon. Senkulpaj eksterlandanoj kaj rifuĝintoj estis bruligitaj vivantaj, atakitaj per maĉetoj, tranĉilegoj aŭ nur bastonegoj. Infanoj, virinoj, olduloj kaj ĉiuj estis perfotigitaj kaj mortigitaj kaj siaj havaĵoj forprenitaj dum la domo estis bruligita.

Sed kial? Estas spekulacioj, kelkaj simplaj dum aliaj seriozaj, kompleksaj aŭ dubindaj. Ekzemple oni ĝenerale akuzas eksterlandanojn, ke ili forprenas laborojn, posedaĵojn kaj virinojn el/de/por civitanoj. Dubindaj estas laŭdiroj ke

politika opozicio aŭ precize la oponentoj de Thabo Mbeki orkestras la amasbuĉojn por forpuŝi la prezidenton el la povtrono aŭ anticipi lian rezignon kaj tiel faciligi al Jakob Zuma, la prezidanto de la reganta partio ANC fariĝi la venonta ŝtatestro.

Ju pli tagojn ni travivas, des pli la politik-analizistoj, alilandanoj kaj ordinaraj nacioj proponas laŭdirajn hipotezojn. Nur la tempo klarigos, kiuj el la hipotezoj veras. Oni diras, ke la registaro pliradikigas sekurecagojn por stabiligi la landon kaj espereble sekurigi la enloĝantojn el aliaj landoj.

En Durbano ekz. rifuĝantoj kaj eksterlandanoj ĝenerale ne plu dormas pace, ili jam persekutigas pro traŭmo. Kelkaj etaĝdomoj estis atakitaj, homoj fuĝis el policejoj aŭ eklezioj, alilandanoj timas iri al la laboro. Kvankam en multaj kazoj ili ne havas manĝaĵon kaj monon; do la vivo fariĝas nebla por multaj, precipe infanoj, virinoj kaj olduloj.

Esperantistoj viktimoj de ksenofobio

Esperantistoj jam estis afektitaj aŭ viktimitaj. Esperantistoj el alilandanoj vivantaj en Sud-Afriko timas pri siaj vivoj kaj tiu de siaj familianoj. Iu advokato por homaj rajtoj konsilis al rifuĝintaj esperantistoj telefoni la policon, se io okazas, sed Durban-anoj jam scias, ke la polico ĉi tie nur venas post la katastrofo kaj tre malfrue. Eble la decido de T. Mbeki, laŭ kiu la armeo intervenu por savi la vivon de eksterlandanoj, estas taŭga, sed ĉu tio eblas en ĉiuj anguloj de Sud-Afriko?

La historio memorigas al ĉiuj, ke nigruloj de Sud-Afriko iam fuĝis pro la apartismo, kaj la najbaraj landoj ne nur bonvenigis ilin, sed en kelkaj kazoj sudafrikanoj ricevis specialan favoran zorgon kaj preferindan traktadon, kiel en Tanzanio kun Julius Nyerere. Ĉu tiel oni repagu la idojn de homoj kiuj helpis al nigruloj kaj bonfarantoj venki la apartismon?

Ĉu fremdofobio aŭ krimemuloj?

La ministro de eksteraj rilatoj jam timas ke la situacio povas turniĝi al civila batalo.

Ĉu sudafrikanoj scias, ke inter la rifuĝintoj kelkaj estis soldatoj kaj ribeluloj en siaj landoj? Kial ataki sendefendajn senkulpulojn?

La konsekvencoj estos multaj jam kaj ekz. sudafrikanoj ne plu vojaĝos fiere en aliajn landojn. Investemuloj timos fari komercajn aferojn. Pli ol unu persono dubas ĉu la tuttera futbalĉampioneco okazos en 2010? Se ĉiuj kuracistoj kaj profesiuloj el najbaraj landoj foriras, ĉu la sentalentaj nigruloj nacioj estos dungotaj de jam timantaj blankuloj kaj hindoj? Ĉu ili mem ne tuj amasbuĉos sin por postenoj en la registaro?

La nuda vero estas, ke rifuĝintoj kaj eksterlandanoj ne forprenas la laborojn de civitanoj. Alilandanoj ĉefe laboras kie nacioj ne volas pro malalta salajro, kiel en sekurecgardado kaj sentalenta veturilgardado aŭ minejoj. Multaj eksterlandanoj faras komercon kaj tiel vivtenas sin. Ekzistas miloj da eksterlandanoj, kiuj kreis firmaojn kaj hodiaŭ dungas sudafrikanojn. Pri virinoj ktp. estas stulte pensi ion, ĉar la nombro de virinoj estas pli alta ol tiu de viraj homoj kaj ĉefe ankaŭ sudafrikanoj edziĝas kun eksterlandanoj. Kie do la problemo estas?

Kial la mondo ne intervenas por alihejmigi rifuĝintojn kaj eksterlandanojn? Ĉu la mondo atendas alian genocidon laŭ la maniero de Ruando?

Verkante tiun ĉi artikolon, mi timas pro mia vivo kaj tiu de mia familio. Proksime de miaj najbaroj oni atakis domojn. Sed mi memoras laŭ la libro de Ester en la Biblio ke Dio estas tie por alilandanoj... Bonvolu helpi rifuĝintajn esperantistojn vivantajn ĉi tie eliri alien. Tiu lando ne plu estas ĉielarka nacio, sed senluma infero, kaj tuj elektra ŝarĝaĵo pli konfirmos tion.

Elisee Byelongo I.S.

Iam delegito de UEA kaj iam vicprezidanto de EASA – Sud-Afrika Esperanto-Asocio, rifuĝinto el DR Kongo nun vivanta en Sud-Afriko; la 22an de majo 2008.

Lingvoj de potenco kaj komuneco

La kvinan de junio renkontiĝis federacia kanceliero Angela Merkel kaj prezidento Dmitri Medvedev en Berlino. Estis la tria ŝtata vizito de la nova Ruslanda prezidento, post Ĉinio kaj Kazahio.

La geŝtatestroj interparolis oficiale pere de interpretistoj. Sinjorino Angela lernis la rusan, kaj sinjoro Medvedev parolas la germanan. Laŭ ĵurnalaj raportoj, ili duope, ekster oficialaj interparoloj, tamen uzis la anglan. La kono de tiu lingvo supozeble ĉe ambaŭ ne estas pli bona aŭ malbona ol la scio de iliaj reciprokaj lingvoj, sed la rilato estas alia; la idiomo estas fremda por ambaŭ. Estas nature uzi lingvon egale mankhavan por ambaŭ. Tre bone tiel, kvankam ne estas esperanto kaj eĉ se estas la angla. (Sed kun prezidento Usona aŭ ĉefministro Brita tio ne eblus!)

Ni esperantistoj emas pensi, ke se homoj parolus esperante, la mondo estus pli bona. Povas esti, sed ni dume ne havas pruvojn pri tio. La rondoj esperantlingvaj estas familiaj, grandaj sed multe pli etaj ol la vivo monda kun ties materiaĵoj. “Homo al la mono sklavas, ĉiam ion li malhavas” (“Ihminen? Pyh! Orja rahan, työn ja touhun, nälkämahan” laŭ Väinö Mäkelä). Se Merkel kaj Medvedev babilus esperante, ili kredeble sentus sin pli senĝenaj ol angle, sed estas dubinde, ĉu tio rezultigus pluson al egal-eco, frateco, solidareco.

La ĉefa temo de iliaj interparoloj estis la planata gastubo trans Balta Maro en la marfundo. La du grandaj ŝtatoj kaj la ekonomiaj potenculoj en ambaŭ landoj volas esti sendependaj pri energio. Ili ne volas ke energitubo iru sur teritorioj de aliaj ŝtatoj. Tio ja aldonus voĉojn en la internacian sociekonomian koncerton kio estus fonto de eventualaj perturboj – aŭ de ekvilibro, dependas de vidpunkto. Neniu ĉe-Balta ŝtato ekster Ruslando kaj Germanio aprobas senkondiĉe, en ▷

La 100-jara festo de Dana Esperanto-Asocio

Dana Esperanto-Asocio celebris la 100-jaran datrevenon inter la 18a kaj 20a de aprilo 2008 en la kulturdomo en Dorteasvej, Kopenhago. Inter la pli ol 70 gastoj kunfestis la vicprezidanto kaj la sekretario de EAF, kiuj kunportis oficialajn gratulojn kaj salutojn de la unu jaron pli aĝa Esperanto-Asocio de Finnlando. Aliaj eksterlandaj gastoj venis el Francio, Germanio, Italio, Litovio, Norvegio, Portugalio kaj Svedio.

La donaco de EAF estis numerigita ekzemplero de *Kalevala* kun salutvortoj en limikforma tristrofa poemo skribita de la asocia prezidanto Tuomo Grundström. La poemo estis publikita en la gazeto Esperanto en Danio en la artikolo, kiu priskribis la feston.

La unua festotago komenciĝis kun bonvenigaj vortoj kaj oficialaj salutoj. Sekvis la festparolo de honora gastoj, Renato Corsetti, prezidanto de Itala Esperanto-Asocio. Artista programo enhavis kaj altkvalitajn muzikaĵojn kaj teatraĵon. Tre ege amuza estis la satira teatraĵo *Estis – Estas – Estos* prezentita de la junulara sekcio DEJO – temis pri la evoluo de la movado dum la jarcento. Posttagmeze okazis ankoraŭ oficiala malfermo de multflanka kaj interesa ekspozicio pri la unua jarcento de la dana Esperanto-movado farita de Mogens Rude Andersen kun kunlaborantoj.

La vendredo finiĝis per bankedo kaj kunkoncerto de JoMo, konata Esperanto-trobadoro el



Mogens Rude Andersen prezentas sian ekspozicion pri la unua jarcento de la dana Esperanto-movado, Tiina Oittinen aŭskultas. (Foto: Päivi Saarinen)

suda Francio. En la fino kunludis kun li Kim Henriksen, kaj tiam ekestis ankaŭ komuna bonhumora dancado. Ni ĉiuj treege ĝuis la unikan atmosferon de la vespero.

La dua tago enhavis ses prelegojn. Detlev Blanke, Anna Löwenstein, Mogens Rude Andersen, Wera Blanke, Renato Corsetti ĉiuj lerte kaj interese parolis pri temoj, kiuj variis de lingvopolitiko, oficiala rekono de Esperanto de Unesko, lingvouzo en internacia familio, publika parolado, bona aŭ malbona lingvo ĝis vivo en Italio antaŭ du mil jaroj. Vespere la festantoj konatiĝis memstare en la fama Tivoli de Kopenhago.

Antaŭtagmeze dimanĉe ni eksterlandaj gastoj ekskursis en la ĉefurbo de Danio. Ni povis konatiĝi kun la historio kaj vidindaĵoj sidante komforte en boato, kiu veturis en la maro kaj kanaloj. Ni vidis la faman marvirineton kaj la novajn operon kaj teatron kaj obeme klinis niajn kapojn subirante la malaltajn pontojn. La ĉiĉerono flue parolis dane, angle kaj germane kaj nia loka gvidanto de DEA kompletigis iam kaj tiam esperante. Tre ĝuebla aranĝo kaj por ni ankoraŭ nekredebla sperto tiel frue en printempo.

La festado finiĝis kun komuna lunĉo en la kultura domo kaj denove estis tempo por adiaŭoj kaj deziroj pri revido ie en Esperantujo. Koran dankon al la prezidanto Ileana Schøder kaj aliaj DEA-anoj pro la afabla festo.

Päivi Saarinen & Tiina Oittinen

Kuulumisia nuorten kevätfestivaaleilta Senigalliasta!

Lähdimme Mian kanssa kohti Milanoa tiistaina 18.3. ja saavuimme illalla hostelliin, jossa vietimme yön. Keskiviikkoamuna jatkoimme matkaamme junalla kohti Senigalliaa. Matka kesti reilut neljä tuntia. Päivä oli oikein aurinkoinen, ja italialaiset maisemat olivat ihanan keväiset. Saimme heti alkumatkasta paikallista matkaseuraa, ja italialaiset ihmiset yllättivät vastaanottavaisuudellaan ja kiinnostuksellaan.

Suurin ja jännittävin hetki koitti Senigalliassa: ensin piti löytää perille juna-asemalta ja sitten vielä ilmoittautua – esperanton kielellä. Paikalle pääsyä helpotti se, että asemalla oli muitakin esperantofestivaaliin saapuneita ihmisiä, joten yhdessä kipusimme oikeaan bussiin, ja matkan varrella tuli mukaan lisää esperantisteja, joiden kanssa pääsimme mukavasti perille. Ilmoittautuminen oli virallisen oloinen, ja siinä kohtaa oli Mian apu kultraakin arvokkaampaa. Alussa tuntui, että pelkkä ymmärtäminenkin oli vaikeaa ja kielimuuri ihan mahdottoman korkea, mutta onneksi ajan kanssa kielen käyttäminen ja ymmärtäminen helpottui. Saimme Mian kanssa “oman” huoneen käyttöön kolmannesta kerroksesta. ▷

▷ nuna stato, la gastuban planon. Estas en pesilo ekologia sekureco unuflanke kaj ekonomia profito aliflanke.

Antaŭ dekok jaroj Sovetunio estis disiĝanta. La plej potenca premrimedo de la malnova reĝimo kontraŭ centrifugaj satelitoj estis la energio. “Nerealisma” ideo aperinta en iuj diskutoj tiutempe estis norda energitubo el Norvegio tra Skandinavio kaj Finnlando kaj plue ŝipe aŭ mar-tube al Baltlandoj. Memkompreneble tute ne

ebla, ĉar ne profita, ne “konkurencopova”. Ekvilibriĝo, egaligo, solidareco en vere granda skalo ne estas konkurencopova. Ĝiaj profitoj estas tro komplikaj.

Komunlingva libereco ne estas konkurencopova. Nia sulko estas ne tiom kaj ne tiel videbla kiel sulkoj fosataj angle kaj en aliaj helplingvoj, sed certe ĝi estas egale valora. Ĉiuj sulkoj fosataj por bono estas valoraj.

Tuomo Grundström

▷ Yllätyksekseni festivaali oli järjestelmällinen (Italian ihme)! Ohjelmaa oli suunniteltu joka tunniksi aamusta kello 8.30 alkaen aina iltamyöhään saakka. Ohjelman sisältö oli todella mielenkiintoinen. Suurimmaksi osaksi osallistuin ohjelmiin, jotka liittyivät kulttuuriin ja kieleen. Ensimmäisen päivän aurinko näyttäytyi uudelleen taas lähtöpäivänämme, mutta sateinen sää ei tunnelmaa haitannut. Parasta antia tapahtumassa olivat innokkaat ihmiset, ja tunnelma oli todella yhteisöllinen. Ensimmäisinä päivinä osallistujia oli noin 40, mutta viikonloppua kohden osallistujamäärä kaksinkertaistui, ja tuntui, että italialaisia osanottajia oli paljon enemmän suhteessa muihin. Yllättävää oli huomata myös kauempaa tulleita esperantisteja, mm. Brasiliasta oli kaksi osanottajaa.

Aamuisin oli esperanton alkeiskurssi, joka oli mielestäni ohjelman parasta antia ruokailun lisäksi. Esperanton alkeiskurssilla oli ihanaa huomata, että oli muitakin, joiden esperanton kielitaito oli alkeistasoa. Viikon lopussa pystyttiin jo käymään yksinkertaista keskustelua. Ruokapöydissäkin käytiin keskustelua, joka aluksi oli kohtuullisen haastavaa, mutta onneksi oli sanakirja apuna.

Ruokailua oli reilussa määrin lähemmäs viisi tuntia päivittäisestä ohjelmasta, ja joka päivä oli kaksi pasta-annosta. Päivä- ja iltaruokailuun liittyi aina kolme ruokalajia. Italia ei ole vegetaristin unelmamaa. Koin, että heille oli suuri ihme ja outous, kun ilmoitin, etten syö lihaa. En kuitenkaan ollut ainoa kasvissyöjä. Ensimmäisenä päivänä sain lautasellisen keitettyä pinaattia ja seuraavana päivänä lautasellisen juustoa ja yhtenä päivänä raakoja kananmunia. Onneksi pasta oli ihanaa, joten söin sitä sitten senkin edestä. Itse tykkäsin eniten aamupalasta, jossa oli kunnon italialainen maitoespresso ja valkoiset paahetosämpylät suklaavoilla ja marmeladilla.



Leikkiä ja lauluakin oli ohjelmassa mukana. Olin mukana hip hop- ja latinalaisamerikkalaisella tanssikurssilla, laulupiirtämiskurssilla, Bao-pelukurssilla, joka oli ihan parasta antia, sekä helmikäsityökurssilla, jossa sain tehdä oman mehiläisen. Teimme myös kaupunkikieroksen Senigalliassa, joka oli oikein pieni viihdyttävä kylä täynnä vanhoja rakennuksia.

Senigalliassa on pitkä 13 km:n ranta, jonka varrella on todella paljon 70–80-luvulla rakennettuja hotelleja. Uskon, että kesällä paikka on ihan erilainen kuin talvisaikaan.

Iltaohjelmaakin oli riittämiin. Ensimmäisenä iltana oli tutustumisleikkejä, muina iltoina oli live-musiikkia, pääsiäiskirkko ja teatteriesitys Zamenhofin elämästä. Kaiken kaikkiaan reissu oli erittäin mielenkiintoinen kielimuurista huolimatta. Tutustuin paljon uusiin ihmisiin ja opin reilusti esperantoa lyhyessä ajassa. Ymmärrykseni esperantokulttuuria kohtaan laajeni, ja tuntui, että viikko meni nopeammin kuin kerkesin ajatella. Asioita tapahtui niin vauhdikkaasti, ettei kerennyt paljon sulattelemaan.

Mari Kaikkonen

Kuvat IJF-festivaalista tällä sivulla ja etukannessa: Miamaria Saastamoinen.

Naturprotektaj programeroj ankaŭ al esperantomovadoj!

Iaj naturprotektaj programeroj, aŭ almenaŭ la planoj, estas nun en la mondo modoj, kvankam iliaj efikoj estas ofte pridemandataj, ĉar dum ilion efikas, la pliiĝanta tekniko en la mondo efikas al la kontraŭa direkto.

Ĝis nun mi legis neniun naturprotektan programeron en la esperantistaj movadoj, kvankam mi partoprenas kaj ricevas la gazetojn el pluraj movadoj. Nu, tre multe ni ne povas fari, ĉar nia movado ĉie estas relative malmulta, kaj ni ne volas malfaciligi la situacion per pluaj distriktaj metodoj... Kion sekve oni faru? Ion mi tamen iel rimarkis: dum oni organizas kongresojn, konferencojn kaj diversajn festojn, al ili ofte oni organizas ankaŭ komunajn vojaĝadojn, sed ŝajnas, ke ili estas precipe aŭ busaj, aŭ aviadilaj, ne fervojaj, kio estus laŭ naturprotekto la plej efika metodo (iam eble ŝipa).

Nu, la samideanoj havas multajn kaŭzojn, el kiuj la plej gravaj estas ofte la tempomanko. La vojaĝadoj perfervoje postulas multe da tempo, pli ol ekzemple per aviadiloj, sed tiel ni povus reklami ankaŭ, ke nia movado celas ŝpari laŭeble la klimaton kontraŭ la malbonaj efikoj kaŭzataj pri la teknikkaŭzaj gasoj kaj aliaj restaĵoj al la naturo. Estas ankaŭ tiel, ke ankaŭ la pli malmulte kostaj vojaĝadoj per la fervojoj povus eble kunen inviti la plej malriĉajn samideanojn, kiuj eble ne povas ekiri, aŭ volas, al la karavana flugado. Sekve, konsideru eĉ pro la naturprotektata celo la ekologiajn eblecojn reklami niajn agadojn!

Pentti Törmälä

Estimata Pentti

Mi tre ĝojas pro via zorgo pri la naturo, sed mi ne konsentas kun via konkludo, ke ne ekzistus naturprotektaj tendencoj en la Esperanto-movado. Mi mem partoprenis ankaŭ trajnajn kunveturadojn en Esperantaj eventoj, kaj – kio la plej ekologia vojaĝrimedo – eĉ biciklajn. Kaj en la eventoj ofte okazas ekskursoj al naturparkoj kaj aliaj naturprotektecaj lokoj. Ankaŭ la finnaj lokaj kluboj ofte organizas tiajn – ekzemple: la Esperanto-klubo de Jyväskylä havas jam plurjaran tradicion viziti iun naturvidindaĵon, FEJO plurfoje havis renkontiĝojn en natureca Kuusiluoto-insulo apud la centro de Helsinki, kaj ni memoru la eksterordinaran laboron de Börje Eriksson por sia natureca Esperanto-bieno.

Indas tamen memori, ke se oni veturas per trajno, oni estas ligata al la fervojoj, tial ofte buso estas la sola realisma rimedo veturigi grupon da homoj al decidita celo. Kaj buse tio tamen okazas multe pli ekologie ol se la homoj veturus unuopaj en siaj propraj aŭtoj. Kaj se oni volas ekzemple el Eŭropo veturi al kongreso en orienta Azio, aŭ inverse – malmultaj estas la homoj, kiuj povus uzi tempon por trajna veturo, kiu daŭras tutan semajnon en unu direkto.

Mi ankaŭ asertas, ke en Esperanto-gazetoj estas multe da artikoloj pri (pli aŭ malpli rekta) naturprotektata temo, kaj mi partoprenis ankaŭ debatojn pri naturprotektaj temoj en la kongresoj. Mia ĝenerala impresio estas, ke averaĝa esperantisto estas multe pli ekologia homo ol cetera averaĝa homo.

Mikko Mäkitalo

Al la esperantistaro

Roterdamo, 28 aprilo 2008

En Ĝenevo, la 28-an de aprilo 1908, Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asocion. Nek la senmondmilita mondo de la tiama tempo, nek la ideo de universaleco, nek la sento de identeco de la esperantistoj restis la samaj ĝis la hodiaŭa tago, en kiu ni, kun ĝojo kaj ankaŭ kun porokaza enpenŝiĝo, festas la centjariĝon de realaĵo nun ĝenerale rekonata kiel la reprezentanta monda Esperanto-organizaĵo.

Mi volus tiun ĝojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. Indas dividi ankaŭ niajn ĉi-okazajn primeditojn. Historiistoj jam dediĉis al tiu ĉi jubileo klerigajn intervenojn. Sendube sekvos aliaj kontribuadoj; ni ne perdu ĉi tiun okazon, en kaj ekster la Asocio, rerigardi ĝian unuan jarcenton, kaj legi kontribuadojn de aliaj por firmigi nian kolektivitan konversacion same vigle, kiel ni tion faris okaze de la centjariĝo de la lingvo mem.

Feste salutas

*Probal Dasgupta, prezidanto
Universala Esperanto-Asocio*

Datrevena simpozio traktis lingvaj rajtojn

La 24-an de aprilo okazis en la Ĝeneva sidejo de Unuiĝintaj Nacioj simpozio pri lingvaj homaj rajtoj, dediĉita al la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la 60-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Unuafoje simila simpozio okazis 10 jarojn pli frue lige kun la 90-a datreveno de UEA kaj la 50-a de la Deklaracio. Memorigante pri la iama traktado pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj en la sama loko, Palaco de Nacioj, prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta atentigis: “En ĉi tiu loko Francio iam metis sian vetoon kontraŭ Esperanto. Eble Privat nun kontentus pri ni.”

En la programo estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj. D-ino Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde, Danlando) pre-

legis pri “Lingvo, edukado kaj (rompo de) homaj rajtoj”. Ŝi aparte emfazis la lingvan rajton de infanoj ricevi edukon en sia gepatra lingvo, kaj la genocidajn situaciojn, kiuj ekzistas, kiam oni praktike devigas la infanojn de difinita popolo transiri al alia lingvo. La temo de prof. François Grin (Universitato de Ĝenevo) estis “Interkompreniĝo kiel strategio por lingva justeco”. Li pritraktis modelon, pri kiu li nun laboras, por utiligi la interkompreneblecon inter lingvoj de la sama grupo en Eŭropo por malpliigi la tradukkvanton kaj samtempe garantii al ĉiu servon en lingvo, kiun li/ŝi povas facile kompreni. Kunlaboranto de Grin, d-ro Michele Gazzola prelegis pri “Instruado en universitatoj: la lingvaj gajnoj kaj malgajnoj pro internaciismo”. Li traktis la malpozitivajn sekvojn de la troigo de la bezono instrui en la angla en eŭropaj universitatoj kaj de la diskriminacioj kontraŭ esploristoj, kiuj ne verkas en la angla. Kiel reprezentantoj de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio, pri ties situacio parolis respektive John Mateo Lopez, ambasadoro Ronald Barnes kaj Flor Rayen Calfunao Paillalef.

En la simpozio partoprenis ĉ. 70 homoj el 13 landoj. Proksimume duono estis ne-esperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la ĉeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean. Jam antaŭ la simpozio ekfunkciis ĝia retpaĝaro www.linguistic-rights.org. La paĝaro estos plu evoluigata.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Malferma Tago en jubilea etoso

La 28-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26-an de aprilo estis markita de la 100-a datreveno de la fondo de Universala Esperanto-Asocio. 125 vizitantoj el 19 landoj plenis la UEA-domon, inter ili ĉiuj estraranoj de UEA, kiuj tuj post la Malferma Tago havis 3-tagan kunsidon.

Oni aŭdis du prelegantojn. La prezidanto de

UEA, prof. Probal Dasgupta titolis sian prelegon “Historio por malfermi la estontecon”, omaĝe al la simbola signifo por nia kulturo de la samtitola ĉina-japana-korea komuna verko pri la konflikta historio de la regiono. Li alvokis al la lanĉo de Esperanta Pedagogio por la 2-a jarcento de UEA. D-ro Ziko van Dijk faris du-partan prelegon pri “UEA tra la tempoj” ordigante sian riĉan materialon per sinsekvo de ĉapitroj kaj demandoj pri la klopodoj konstrui mondiskalan tegmenton por la Esperanto-movado.

Plene konkeris la publikon Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer el la kantogrupa Kajto, kiuj donis du unuhorajn koncertojn. La programeron “TEJO sin prezentas” prizorgis prezidanto Gregor Hinker kun la volontulino Julia Noe. La pinta titolo de la libroservo, kun 21 venditaj ekzempleroj, estis la freŝe aperinta “Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj”, sekvata de la libro de Heidi Goes pri la historio de Esperanto en Afriko, “Afero de espero”, en 16 ekzempleroj. La vendoj de varoj sumiĝis entute je 3135,87 eŭroj.

En la vespero la Estraro de UEA invitis la stabon de la Centra Oficejo, kelkajn eksoficistojn kaj aliajn gastojn al jubilea bankedo. La sekva Malferma Tago okazos sabaton, la 29-an de novembro.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Zamenhof en loteribileto

La portreto kaj la nomo de Zamenhof ornamos venontan loteribileton de la hispana blindulara organizo.

La Organizo de Hispanaj Blinduloj (konata per la siglo ONCE) estas certe unu el la plej sukcesaj en la tuta mondo, pro siaj laboroj en la integriĝo de blinduloj en la socio. Granda parto de la sukceso ŝuldiĝas al ties loterio, tre konata en la tuta lando per la nomo “Cupón”. Tiu kuponono, vendata ĉiutage, kaj kun specialaj premioj en difinitaj tagoj de la semajno, montras foje specialajn

bildojn kun diversaj motivoj.

La kuponono de la venonta 17-a de majo portas la portreton de D-ro Zamenhof, kun la teksto, “L. L. Zamenhof, creador del esperanto, precursor en la creación de un mundo para todos”, kaj apude “2008, Año Internacional de los Idiomas” (“L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, pioniro en la kreado de mondo por ĉiuj. 2008, Internacia Jaro de la Lingvoj”).

La iniciaton por tiu ĉi demarŝo prenis laborgrupo kiu en la sino de Hispana Esperanto-Federacio organizis diversajn agadojn por la kunmemoro de la Internacia Jaro de Lingvoj 2008.

komunikis Hispana Esperanto-Federacio

FEJO-tendaro en aŭgusto

Tempo: 23.-24.8.

Loko: Yyteri (en Pori)

Eblos dormi en propra tendo aŭ en luata dometo, laŭ la prezoj de Yyteri – vidu www.pori.fi/yyteri Pri pli precizaj planoj sekvu la retpoŝtliston kaj ttt-paĝon de FEJO. Aliĝu plej laste 10.8. al paula.niinikorpi@gmail.com. Pensu jam anticipe pri kiel vi volas tranokti, en tendo aŭ en dometo!

FEJO-tendaro 23.-24-8. Porin Yyterissä, mahdollisuus yöpyä omassa teltassa tai vuokramökissä. Ilmoittautumiset viimeistään 10.8. osoitteeseen paula.niinikorpi@gmail.com.

(estraro de FEJO)



Aŭtunaj Tagoj en Heinola 20.-21.9.2008

Venu ĝui kaj amuzi en bela Heinola

Syyspäivät Heinolassa 20.-21.9.2008

Tule viihtymään esperanton merkeissä
kauniiseen Heinolaan

Hotelli Kumpeli, Muonamiehenkatu 3, Heinola

La Aŭtunaj Tagoj prenos nin ĉifoje al Heinola, unu el la plej belaj urboj en suda Finnlando. Ni konatiĝos kun lokaj vidindaĵoj piede kaj buse. Ni vizitos urban muzeon, oktaedran preĝejon konstruita en 1807-11, kaj birdejon, kie oni povas provi paroleti kun du papagajoj. Dum la dimanĉa rondveturo ni vidos la ĉirkaŭaĵon de la urbo kaj transiros la ponton super la Jyrängönkoski rapidfluo, kiu estas preskaŭ en la urbo-centro.

Ni tranoktos en hotelo Kumpeli, kiu situas en bela loko surborde de la fluo Kymi. Aliaj programeroj, aranĝataj en la hotelaj kunvenoj, enhavas prelegetojn pri la urba historio, ekzemple pri la fama instruista seminario de Heinola.

Vespere nin atendas agrabla kaj amuza koncerto: Fransŭaz Rochette de la muzikgrupo Double Unu venos denove al Finnlando. La grupo vizitis la festivalon Arta Lumo lastsomere kaj nun Fransŭaz deziras reveni al Finnlando. Laŭ eblecoj EAF aranĝos koncertojn ankaŭ en aliaj lokoj en Finnlando.

Detala programo aperos en la sekva Esperanta Finnlando, sed vi povas jam nun aliĝi laŭ la informoj en la aliĝilo. Kontaktuloj pri AT-aferoj estas EAF-funkciuloj Päivi Saarinen kaj Tiina Oittinen, kontaktinformoj por ambaŭ sur paĝo 2. Vi povas ankaŭ viziti la ttt-ejon de Heinola en la adreso <http://www.heinola.fi> por konatiĝi kun la urbo kaj ĝiaj servoj.



Lagborda parko en Heinola

Tämänvuotiset syyspäivät vievät meidän yhteen Etelä-Suomen kauneimmista kaupungeista. Tutustumme monipuolisesti Heinolan kaupunkiin ja näemme hieman ympäristöäkin. Heinolan nähtävyyksistä käymme kaupunginmuseossa, 1807-1811 rakennetussa kahdeksankulmaisessa kirkossa ja lintutarhoissa, joissa voi mm. yrittää keskustella puhuvien papukaijojen kanssa. Sunnuntaina on vuorossa kiertoajelu kaupungin ympäristöön ja silloin ylitämme tietysti sillan, joka on rakennettu Jyrängönkosken yli.

Majoitumme hotelli Kumpeliin, joka sijaitsee luonnonkauniilla paikalla Kymen virran rannalla.

Hotellilla ohjelmassa on ainakin esitelmä Heinolan maankuulusta opettajaseminaarista sekä muista kaupungin aktiviteeteista. Illalla on luvassa kansainvälistä esperantotaidetta: toinen ranskalaisen yhtyeen Duoble Unun taiteilijoista **Françoise Rochette**, tulee jälleen Suomeen. Luvassa on haus-



ka ja viihdyttävä konsertti. Mahdollisuuksien mukaan EAF järjestää konserttikiertueen muualla Suomessa jo ennen syyspäiviä.

Syyspäivien tarkempi ohjelma tulee seuraavaan Esperantolehteen. Mutta voit heti ilmoittautua päiville tässä lehdessä olevan ilmoittautumislomakkeen tietojen mukaan. Lisätietoja syyspäivien järjestelyistä antavat liiton varapuheenjohtaja Päivi Saarinen ja sihteeri Tiina Oitinen. Molempien yhteystiedot ovat lehden sivulla 2. Heinolan kotisivuilla <http://www.heinola.fi> voi jo etukäteen tutustua kaupunkiin.

ALIĜILO

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 20.-21.9.2008 en Heinola.

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo:

14 e ĝis 15.8.2008 _____

18 e ĝis 5.9.2008 _____

21 e poste _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

AT-paketo 20.-21.9.2008

122 e

inkl. tranoktadon (2-lita ĉambro) en hotelo Kumpeli, manĝojn (kafo kaj vespermanĝo sabate, tagmanĝo dimanĉe) kaj rondveturon dimanĉe. _____

Entute pagenda al la konto de EAF _____

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.
Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640**.

Pliaj informoj aŭ deziroj _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 20.-21.9.2008 Heinolassa

Nimi _____

Osoite _____

Puh./fax/sähköposti _____

Ilmoittautumismaksu:

14 e 15.8.2008 saakka _____

18 e 5.9.2008 saakka _____

21 e 5.9.2008 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

AT-paketti 20.-21.9.2008 **122 e**

sis. yöpymisen 2-hh hotelli Kumpelissa, ruokailut (kahvi ja illallinen lauant., lounas sunn.) ja kiertoajelun sunnuntaina. _____

Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille _____

Tilinumero: Sampo 800017-230825.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia _____

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki
tai tiedot sähköpostitse:
eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

Estraro decidis

7.6. la lokon kaj daton de Aŭtunaj Tagoj: Heinola 20.–21.9. Vidu detalojn sur p. 14 kaj preferinde tuj decidu kaj aliĝu!

EAF partoprenos en Roterdama UK la Movadan Foiron. Karavano el Finnlando veturigos parton de la kongresanoj.

Valamo-kurso estos grandeta, dudekkvino da kursanoj.

EAF membras en tri organizaĵoj, UEA, Eŭropa Esperanto-Unio kaj Suomen YK-Liitto (Asocio por UN en Finnlando). Estis aprobitaj ties membrokotizoj.

Estis pridiskutitaj ideo de subtena membreco en EAF, kaj pli ĝenerale statuto kaj regularoj. Pri tio vidu la artikolon de Vilorg Teräväinen, p. 18.

Estis konstatitaj kaj aprobitaj raporto al subtenintoj de jubile-jaraj aranĝoj.

Eventokalendaro de EAF

2008

23.-27.6.2008 Esperantokursoj, Heinävesi (Valamon kansanopisto). Kurso estas laŭnuna scio plena kun 25 gekursanoj.

28.6.2008 je 11.00 Publika prelego en la biblioteko de Jyväskylä. Atilio Orellana Rojas: Argentinano en Eŭropo (esperante kun interpretado en la finnan)

19.-26.7.2008 Universala Kongreso de Esperanto, Roterdamo, Nederlando (UEA) Karavano BR4 al UK 17.-28.7. ĝis nun 25 partoprenantoj, ankoraŭ kelkaj liberaj lokoj, informiĝu ĉe EAF-sekretario

26.7.-2.8.2008 Internacia Junulara Kongreso, Szombathely, Hungario (TEJO)

23.-24.8.2008 FEJO-tendaro en Yyteri, Pori

20.-21.9.2008 Aŭtunaj tagoj de EAF en Heinola

Laborkunsidoj

30.8.2008 Estraro

Ĝeneralaj scioj pri Esperanto en lokaj gazetoj

En du lokaj gazetoj oni prezentis esperantolingvon, en Hankasalmen Sanomat 14.2.2008 kaj en Salonjokilaakso 6.3.2008. Hankasalmen Sanomat aperas foje en semajno en Hankasalmi, kiu estas 44 kilometroj al oriento el Jyväskylä kaj Salonjokilaakso aperas en Salo. Ĉi-lasta aperas ankaŭ foje en semajno en dekdu municipoj.

Rautatielähetys-gazeto menciis, ke reprezentanto de Esperanto-klubo de Helsinki Sakari Kauppinen kaj kelkaj esperantoamikoj vizitis en solena fermo de agado de printempo. Tio estis evento de Rautatieläisten kristillinen yhdistys de Helsinki distrikto. Esperantistoj de Helsinki-klubo rakontis pri centjara agado de EAF, kiu pleniĝis 2007. Gazeto estas numero 1/2008.

En Hankasalmen Sanomat Sandra Markkanen skribis bonan prezenton pri esperanto. Rubriko estas: "Ĉu vi parolas Esperanton?" Ŝi rakontis, ke la lingvo estas la plej parolata internacia lingvo. Ankaŭ ŝi rakontis pri gramatiko de esperanto, en kiom da landoj homoj parolas ĝin, pri libroj, kiujn oni publikigis en esperanto kaj pri estonteco de la lingvo.

En komenco Markkanen demandis, ĉu estus facila, se estus unu lingvo, kun kiu ĉiuj homoj povus paroli inter si. Tiam oni ne bezonas interpretistojn kaj zorgado de aferoj sukcesas ankaŭ kun homoj, kiuj loĝas en alia flanko de la mondo facile.

L.L. Zamenhof estas patro de esperanto. Lia intenco estis krei internacian planlingvon, kiu funkcias kiel la dua lingvo de homoj. Vortaro estis komence malgranda, ĉar li sciis, ke la lingvo ellaboriĝos kun la uzo. Nun la kvanto de bazvortoj estas proksimume 20 000.

En gramatikon de esperanto oni kolektis multajn influojn el aliaj lingvoj. Gramatiko estas simpla kaj esceptoj estas vere malmultaj. Kun bazvorto estas facile konsistigi apartajn vortojn

de aliaj vortklasoj. En esperanto ne estas malregulaj verboj.

Gepatra lingvo de multaj esperantistoj estas iu nacia lingvo. Ili uzas esperanton nur, kiam ili komunikas kun homoj, kiuj parolas aliajn lingvojn. Kelkfoje la sola lingvo de geedzoj povus esti esperanto.

La plejparto de esperantistoj loĝas en Mez-Eŭropo aŭ en orienta Azio. La lingvo estas oficiala lingvo de neniu lando, sed kelkaj organizaĵoj uzas ĝin oficiale.

Literatura tradicio de esperanto estas vasta. Originalaj kaj tradukitaj libroj estas multaj kaj ĉiujare publikiĝas proksimume 300 verkoj. Ĉi tiuj estas grava faktoro, kiu trakonektas esperantistojn. Eble tial esperanto sternaĝis ĉirkaŭ la mondo. Proksimume super 100 gazetoj aperas en esperanto, interalie Monato, Esperanto kaj Kontakto. Ĉirkaŭ la mondo oni povas aŭdi programojn en esperanto en radio.

Oni faris muzikon dekomence de invento de la lingvo. Muziko estas ekzemple roko, korusokantoj kaj tiel plu. M.A. Numminen kantis en esperanto kaj ĝis nun oni faris proksimume dudek filmojn en esperanto. En interreto oni uzas lingvon en blogoj kaj tujmesaĝiloj. Sandra Markkanen skribas, ke esperanto estas sendube lingvo de estonto.

En Salonjokilaakso ĵurnalistino Jaana Shelby intervjuis vicprezidanton de Esperantoklubo de Salo, Carola Antskog, kiel ankaŭ gimnazianojn Anna Mäkitalo, Maija-Leena Vihanto kaj Miamaria Saastamoinen.

Carola Antskog rakontis, ke Esperantoklubo de Salo fondiĝis 1978 kaj ĝi aranĝas lingvokursojn en sabatoj. Klubo partoprenas ankaŭ ĝemelurbajn agadojn de urbo Salo. Esperantistoj el ĝemelurbo de Salo en Svedio, Katrineholm, vizitis jam kelkajn fojojn ĉi tie.

Anna kaj Maija-Leena aŭdis pri esperanto en ▷

Mia danko kaj opinio

Unuavice mi dankas partoprenantojn de Jarkunveno pro la konfido, kiun ili montris elektinte min esti EAF-vicestrarano.

Mi ja neniam en Sovetunio havis rajton okupiĝi pri similaj aferoj, ĉar havis limigojn. Antaŭe Esperanto en Sovetunio estis malpermesita. En historio de la movado estas nigraj tagoj kiam en la jaroj 1937-38 estis likviditaj tutmonde konataj sovetiaj esperantistoj. En la sama tempo mia avo kaj miaj gepatroj ricevis la saman sorton.

Pri ekzisto de Esperanto la homoj de Sovetunio, kaj inter ili ankaŭ mi, eksciis nur en la jaro 1974, kiam aperis la unua (post la nigraj jaroj) vortaro kompilita fare de doktoro de filologiaj sciencoj E.A. Bokarev. Sed tiam jam estis la tempo, en kiu mi ne havis sufiĉan liberon por aktiva partopreno en la movado. Mi povis nur ĝui literaturon, okupiĝi pri tradukado kaj renkontiĝi kun geklubanoj. Tamen por mi Esperanto estis kaj estas ne sole agrabla ludilo kaj ĝuilo, sed unuavice genia invento, serioza helpolingvo kaj lingvostuda laborilo.

Esperanto ludis gravan rolon en mia vivo. Ja nome esperantistoj siatempe ebligis mian korespondadon kun la finnlandaj parencoj kaj poste transloĝiĝon kaj ricevon de finnlanda civitaneco. Esperanto ankaŭ helpas min explore lerni nuancojn de finna lingvo, kio montras al mi ties

propedeŭtikan potencialon. Sed nun antaŭ mi staras la demando, ĉu miaj scioj kaj intereso povus esti utilaj al la socio entute kaj al la movado aparte? Ĉu tiuj respondas al lingva politiko de la homoj, kiuj kapablas influi al ĝi?

Por trovi la respondon mi studis la EAF-statuton, sed trovis, ke ĝi ne respondas al tiuj atingoj, al kiuj nun jam ĝisiris la movado en EAF renkonte al la centjariĝo. Mi opinias, ke ĝisnuna enhavo de la statuto ne plu helpas evoluigi la atingojn, sed povas eĉ iel bremsi tiujn.

Laŭ mia opinio la asocio devus montri en la statuto ne sole siajn laŭlegajn normojn, sed ankaŭ la kondiĉojn, kiuj garantius sukceson de la movado kaj atingeblon de ties ĉefa destino – riĉigi sociajn rilatojn per helpa internacia lingvo. Por tiu celo inter aliaj agoj de asocio devus esti ankaŭ tasko utiligi gravajn avantaĝojn de Esperanto. Temas ne sole pri avantaĝoj, kiuj estas tutmonde konataj, sed ankaŭ pri tiuj, kiuj dume ne estas konataj, ĉar ili ne kongruas tradician lingvosciencan paradigmon. Nur malgranda anguleto de tiuj avantaĝoj jam estas uzata por propedeŭtikaj celoj. Sed la avantaĝoj en sia tuteco povus aperigi novan agadirekton de asocio.

*Vilorg Teräväinen
vicestrarano de EAF*

▷ gimnazio. Anna Mäkitalo lernis lingvon unue en kurso de popolaltlernejo kaj poste en interreto. Maija-Leena Vihanto lernis ĝin memstare en interreto. Ambaŭ diris, ke esperanton estas facile lerni.

Ili kaj Miamaria partoprenis en jaro 2006 en vojaĝo al Francio, kie la virinoj renkontis aliajn esperantistojn. Ili vizitis en Parizo kaj Strasbourg kaj noktis ĉe esperantofamilio en Parizo. Per Pasporta servo oni povas renkonti esperantistojn en aliaj landoj. Miamaria pensas, ke la

plej bona en esperanto estas, ke estas facile lerni ĝin, kvankam ĝi estas fremda lingvo. En pasko ŝi partoprenos junularfestivalon en Italio.

En kursoj oni ne lernis esperanton kiel antaŭe, sed en interreto estas bonaj kursoj por lerni esperanton. Ĝi estas bona ankaŭ por internaciaj konektoj, kvankam la mondo ŝanĝiĝis cetere.

En foto de artikolo Anna, Maija-Leena, Miamaria kaj Carola estas antaŭ la domo de la Eŭropa Parlamento.

Jukka Noponen

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@welho.com.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki
jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530
onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 040 867 2743 seija.kettunen@pp5.inet.fi
- ♦ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. martti.pennanen@phnet.fi
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry, (Olli Pajula) Salamakuja 4 as 2, 90420 Oulu. <http://esperantooulu.info/>
olli.pajula@baanamail.fi
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla
matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823
tapani.aarne@mbnet.fi)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärsvägen 89, 25700 Kimito. cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 445023-283606
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 12 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnassa on perustettu uusi yhdistys, Verda Kastelo R.Y. – Esperanto-Societo en Hämeenlinna, joka ei vielä ole EAF:n jäsenjärjestö. Yhteystiedot: Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna.
verdakastelo@gmail.com

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2008**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
4	10.7.	15.7.	5.8.
5	10.9.	15.9.	5.10.
6	10.11.	15.11.	5.12.

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Vortaroj kaj forumoj en lernu!

Bonvenon ĉiuj al la paĝaro de lernu! por testi kaj uzi vortarojn. Mi instigas vin por ĉia kunlaboro plibonigi ilin. Vi ne bezonas registriĝi por uzi ilin sed tio estas rekomendinda ĉar tiam vi povas uzi la mesaĝsistemon de lernu. Vi trovas facile la adresojn de uzantoj, el Finnlando aŭ el la tuta mondo, kaj povas tuj sendi viajn leterojn aŭ bildkartojn. Vi povas skribi pri kaj per esperanto sed rimarku ke ĉiuj lingvoj kaj temoj estas por vi uzeblaj. En la forumo estas eble legi kaj skribi en pluraj lingvoj. Nun esperante, angle, hispane, germane, ruse, itale, france, hungare, ĉine, portugale, nederlande, litove, pole, koree, arabe, norvege, greke, hebree, japane kaj fine en la persa lingvo.

<http://fi.lernu.net/komunikado/forumo/index.php>

Por skribi en lernu-forumo validas nun la sekvaj reguloj. Eble vi povas kompari kun aliaj reguloj kaj la reala uzado en aliaj forumoj.

1. Ne skribadu pri io, kio tute ne rilatas al la temo.

2. Kontrolu, ĉu la temo, kiun vi kreas, ankoraŭ ne ekzistas en la forumo.

3. En esperant-lingvaj fadenoj skribu nur en Esperanto.

4. En nacilingvaj fadenoj skribu en tiu lingvo, por kiu ĝi estas kreita. Se vi skribas en Esperanto, bonvolu traduki la tekston nacilingven.

5. La sola loko, kie vi rajtas uzi forumojn por komercaj celoj, estas sub la temo "Pri ĉio cetera"

6. Multnombraj samaj aŭ preskaŭ samaj mesaĝoj estas malpermesitaj.

7. Ne kalumniu kaj ne diskutu nehoneste. Ekzemple, estas malpermesite kripligi la sencon de aliaj mesaĝoj, ŝanĝi viajn komentojn kun la intenco kaŝi aŭ kripligi la sencon, provoki aliajn uzantojn malobservi la regulojn.

8. Ne enmetu rubaĵojn.

9. Obeu la administrantojn de la paĝaro. Se vi estis avertita traduki vian mesaĝon aŭ korekti ĝin, ĉar ĝi ne obeas la regulojn, faru tion. Aliaj okazaj viaj mesaĝoj estos forĵetitaj, kaj poste vi estos blokita, kaj ne plu povos uzi la paĝaron.

*Amike, Teuvo
www.lernu.net*

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuussa. Jutut 15.7.2008 mennessä EAF:n toimistoon. La venonta numero aperos en aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2008 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eafigazeto@esperanto.fi>.